
**BELETRA KONKURSO**

# LITERA TURO 2011



*Esperanto Vannes* invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la nova beletra konkurso *Litera Turo 2011.* Ĉi-jare estas proponitaj tri branĉoj:

**1. Originala prozo**

**2. Originala poezio**

**3. Traduko el la franca lingvo**

La laŭreato de ĉiu branĉo* ricevos premion okaze de la Zamenhof-a tago de la klubo *Esperanto Vannes*, la **23-an de januaro 2011**.

***Sukceson !***

** Iu branĉo de la konkurso efektive okazos kondiĉe, ke estos minimume tri partoprenantoj en tiu branĉo.*

# REGULOJ DE *LITERA TURO* 2011

## Originala Prozo

- Vi rajtas skribi novelon, eseon aŭ fabelon (sed nek teatraĵon nek artikolon).
- Limo: maksimume 10 000 vortoj
- La sendota(j) verko(j) devas esti plena(j). Neniu fragmento (ekz. ĉapitro el romano) estos akceptita.
- Respektu la Esperantan tipografion.
- Vi rajtas konkursi per maksimume du originalaj prozverkoj.

## Originala Poezio

- Vi rajtas skribi poemon aŭ kanton riman aŭ ne (sed ne versteatraĵon).
- Limo: neniu
- La sendota(j) verko(j) devas esti plena(j). Neniu fragmento (ekz. ĉapitro el versromano aŭ strofo el longa poemo) estos akceptita.
- Vi rajtas konkursi per maksimume du originalaj versverkoj.

## Traduko el la franca lingvo

- Vi devas traduki la jenan tekston: *La main* de Guy de Maupassant (eltiraĵo)
- Vi povas mendi la tradukendan eltiraĵon (formato: .pdf) retpoŝte ĉe litera-turo@live.fr.
- Respektu la Esperantan tipografion.
- Vi rajtas konkursi per maksimume unu tradukverko.

## Sendi konkursaĵojn

- Sendu via(j)n verko(j)n prefere retpoŝte al litera-turo@live.fr kaj indiku viajn nomon kaj adreson.
- Aŭ, se ne eblas al vi sendi retpoŝte, sendu tri tajpitajn, komputile kompostitajn ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo (kun nomo kaj adreso) perpoŝte al: Mathieu Thépaut, 13 rue du recteur Paul Henry 35000 Rennes, France (Francio).
- Limdato por ĉiuj branĉoj de la konkurso: **15-a de decembro 2010**.
- Prefere skribu kun Esperantaj supersignoj aŭ nepre indiku la surogatkodon (X aŭ H).
- Akceptindaj formatoj: .doc .docx .odt .pdf .xps .rtf .txt .wps